

VIVO, HISTORIO KAJ LEGENDO PRI ETRUSKA FAMILIO.

Ni havas malmultajn noticojn pri la vivsistemo de la etruska familio.

La fama etruskologo Jacques Heurgon en sia verko "Ĉiutaga vivo de Etruskoj" mencias la vidpunktojn de grekaj kaj latinaj aŭtoroj kiuj akordiĝas pri tiu temo. Laŭ la greka Teopompo: "La Etruskoj metas siajn virinojn en komunecon kaj kreskigas la naskiĝantajn infanojn ne sciante kiu estas la patro de ĉiu el ili." Tito Livio, malpli sarkasma, prezentas al ni " etruskan edzinon kiu sin elmontras kaj okupas konsiderindan postenon sen iĝi ruĝa".

Verŝajne la etruska virino kondukas alimaniere ol la greka kaj la romana, kiuj travisas siajn tagojn en ombro nur prizorgante hejmon kaj gefilojn. La etruska virino mem gardas la doman fajrujon sed interkonsente kun la edzo, kaj ŝi, aldone, okupiĝas persone pri la aranĝo de meblaro, ilaro, kaj kontrolas la disvolviĝon de la hejma aktiveco. Ŝi ĉeestas bankedojn, publikajn manifestaciojn, politikajn asembleojn pridiskutante kun viroj pri gravaj temoj. Ŝi rafinas sian fizikan aspekton, vestante sin kun eleganta stilo kaj sin ornamas per altvaloraj juveloj. Ŝi ĝuas, do, grandan liberecon de movoj kaj de rajtoj. En tiama epoko tia virina konduto povintus aspekti kiel disponeblo al la plej malbonaj senregulecoj. Tamen en familio ŝi ĝuas grandan konsideron tiel ke, eĉ edziniĝinta, ŝi plutenas sian originan nomon kaj transigas ĝin al la gefiloj. Ŝi rajtas obteni privilegion tomblokon, ĉar la parencoj ofte konfuzas la mortintan domestrinon kun la plej potenca diino: la Tero-Patrino. Ŝiaj privilegioj povus deveni ankaŭ de la konstanta malpliigo de maskloj, kaŭze de multaj militoj kontraŭ la najbaraj regionanoj. Pro tio la virino alprenas juran kondiĉon por la daŭrigo de la generacio.

En familio, do, la domestro faras leĝon kaj la edzino povas kontesti ĝin kaj tre ofte ŝia vorto estas la lasta.

La Etruskoj praktikas nediskutindan kulton por la mortintoj. Pro tio ili deziras postlasi neforgeseblan bildon pri si mem kaj pri la familio. Ili modeligas tombon en formo de sia domo kun, ene, ĉambroj, meblaro, ilaro, altkvalita potaro, altvaloraj juveloj utiligitaj dumvive. Oni eltrovis cindrounojn en formo de kabano, kiuj reproduktas la praloĝejojn je komenco de tiu civilizo.

El la strukturoj de la tomboj kaj el la dekoraĵoj aŭ gravuraĵoj, aperintaj sur vandoj kaj objektoj, ni povas koncepti la disvolviĝon de ĉiutaga travivo en etruska familio. La tomboj de la anonimaj geedzoj en Cere, ekzemple, efektas malsame ol la priskribo de la antikvaj historiistoj pri la edzeca ligo. La geedzoj kuŝantaj unu ĉe la alia sur la funebra lito, montras ameman sintenon kaj iliaj vizaĝoj manifestas perfektan akordiĝon.

La etruska familio ne konzistas nur el samsanguloj sed ankaŭ el aliaj membroj enkorpiĝitaj en la familia grupo aŭ memvole, aŭ ĉar ili estas sklavoj liberigitaj. Tiuj ĉi estas nomataj "klientoj" kio signifas "obeemajn" ĉar ilia kondiĉo estas subordinata al la domestro.

Tia situacio estas ofte konsekvenco de postbatala cedo aŭ de propravole sindevigo kiu postulas protektadon fare de domestro kaj korespondado fare de kliento en okazo de milito, aŭ en servuteco, aŭ en financaj malfacilaĵoj. La klientoj rezignas eĉ proprajn familian nomon kaj hejman diikulton por surprizi tiujn de la domestro.

Al pli malalta rango apartenas la servistoj – mezvoje inter klientoj kaj sklavoj. Kvankam ili estas klasitaj - familianoj-, tamen elstaras netransirbla limlinio kiu disigas la domestraron de la servistaro. Eĉ en la domo estas bariera vando disiganta la domestrarnajn ejojn de tiuj de la servistoj por ke la malbonodoroj kaj la bruoj de ĉi –lastaj ne ĝenu la domgesinjorojn.

En la urba familio la estroj estas aristokratoj, altgradaj funkciuloj, juĝistoj, kondotieroj, haruspeksoj, tio estas ministroj de divenarto. La servistoj estas domhelpantoj, kuiristoj aŭ flutludantoj, aktoroj, dancantoj. La dohelpantinoj prizorgas personojn kaj domon, bontenas potaron kaj arĝentaĵaron aŭ estas dancantinoj.

En la lampara familio la estroj estas riĉaj latifondiuloj kaj la servistoj estas kamplaboristoj, bestgardistoj, arbaristoj, muelistoj kaj ĉiuspecaj metiistoj. La sklavoj estas ombroj sennomo kaj senvoĉo. Ili estas utiligataj por la plej humilaj laboroj aŭ trejnataj en palestroj al la lukto, bokso aŭ al la interbatalo de gladiatoroj. Dum la maraj komerco kaj milito ili necesas kiel remistoj.

Ju pli multnombraj estas la servistoj des pli riĉa kaj potenca estas estimata la familio. Krome, la servistoj, siavice, sekve de geedziĝoj kaj de naskiĝontaj filoj, pliigos la laborkapablojn favore de la domestro.

Por la Etruskoj la tago komenciĝas de tagmezo kaj finiĝas je la sekvanta kiam la suno tuŝas la plej altan punkton en la ĉielo.

La greka verkisto Posidonio rakontas ke: “ĉe la Etruskoj ĉiutage oni preparas dufoje luksegan tablon, oni pretigas litkovrilojn broditajn per floroj, oni disponas amason da arĝeta vazaro kaj la kunmanĝantoj servigas sin de granda nombro da servistoj.

Ankaŭ el ĉi tiuj kaj aliaj indikoj oni povas supozi la tagan disvolviĝon en la etruska familio.

Je la unua taglumo kuiristoj, buĉistoj, bakistoj kaj pistuloj, duone aŭ tute nudaj, aktive eklaboras por pretigi manĝaĵojn kaj malsimplajn saŭcojn dum la flutludistoj ritmas, muziksone, iliajn movojn. Trans la disiganta bariera vando, en vasta salo aŭ en bankedsalono, laŭ la hejma disponeblo, la domhelpantinoj, je ordono de domestrino, elegante vestita kaj ornamita per juveloj, disponas, antaŭ la litoj dislokita laŭ la vandoj, tripedajn tablojn kaj kovras ilin per broditaj tablotukoj. La vinverŝistoj, ĉu elegante vestitaj super sia rango, ĉu tute nudaj, laŭ nekongruaj atestoj, metas sur la tablojn pokalojn el argilo, aŭ ceramiko aŭ eĉ el arĝento, arte forĝitajn, kaj dekoraciitajn aŭ cizelitajn.

En alia ĉambro la domestro klarigas al la klientoj la programon por la taga aktiveco. Poste la kunmanĝantoj, duope, sterniĝas sur la litoj dum, sube, hundoj aŭ kokoj atendas la falantajn restaĵojn.

La domhelpantoj alportas el la kuirejo abundajn pladojn kaj vinverŝistoj verŝas el kruĉoj vinon en la potalojn. La flutistoj akompanas la movojn precipe per manoj, de la dancantoj. Sklavoj, ĉirkaŭ la tabloj movas grandajn ventumilojn el plumoj. Aliaj purigas la plankon de kraĉoj de la kunmanĝantoj. Aktoroj cerbumas elpensante spektaklon por amuzigi la ĉeestantojn.

Oni supozas ke en la kampara familio la bankeda rito estas preskaŭ la sama sed eble malpli luksa kaj komforta.

Je la fino de bankedo la manĝintoj siesta amuzante sin per tabloludoj kiel, ekzemple, la “kotaboi”. La ludantoj, ĉiam sternitaj sur la litoj, ĵetas vinon el la pokaloj kontraŭ metalan telereton subtenitan de stango. Tio kaŭzas sonon kiun oni devas interpreti. La venkinto rajtas al premio kiu povas esti la agrabla kunestado de knabo aŭ knabino partoprenantaj la bankedon.

Poste viroj kaj virinoj partoprenas en publikaj manifestacioj gravaj por la urba aŭ kampara vivo kiel, ekzemple,: geedziĝoj, funebraj ceremonioj, religiaj ritoj, rikoltoj kaj vinrikoltoj; aŭ ili spektas sportajn konkursojn, lukto- kaj –bokso matĉojn aŭ interbatalojn de gladiatoroj.

La muziko estas esenca elemento kiu akompanas ĉiun dumtagan agon, eĉ por ritmi la interŝanĝon de pugnoj de la boksistoj kaj la hufklakojn de la ĉevaloj dum la ĉarkuradoj.

Ne ĉiu domo havas dormoĉambrojn disigitajn de bankedsalono. Ofte la manĝoĉambro utilas ankaŭ kiel dormoĉambro. Tamen la servistaro dormas en antaŭa parto de la domo aŭ en apuda konstruaĵo.

Kvankam la sciigoj estas nesufiĉaj kaj ofte malakordaj, tamen, io estas certa: la interligo kiu kunigas la domestrojn kun la servistoj, malgraŭ la bariero disiganta ilin socie kaj materie. Tio estas frukto de socia strukturo bazita sur vasta subordita laborado. Super ĉio regas mastreco ensorbita en lukso kaj nenifaro.

La domestroj proponas protektadon, daŭran vivrimedon al la servistoj-familianoj kaj administras ilian vivon. Interŝanĝe ili ĝuas la plej parton de rikoltoj, de metiista produktado kaj ekspluatas konstantajn laboron kaj helpon okaze de militdanĝero.

Aŭtorino: Norma Covelli